REZOLUCIO
de la XXIV kongreso de Ukrainia Esperanto-Asocio en Lvovo

La XXIV-a kongreso de Ukrainia Esperanto-Asocio, kunveninte en Lvovo kun 42 partoprenintoj el 9 ukrainaj urboj kaj el 4 fremdaj landoj

KONFIRMAS la grandan aktualecon de la kongresa temo "La kulturoj nacia kaj Esperanta: vojoj al la dialogo";

NOTAS la koincidon de tiu ĉi temo kun la proklamo de 2018 la jaro de E-kulturo, temo de UK-2018 en Lisbono, inaŭguro de la memortabulo omaĝe al elstara blinda ukraino-esperantisto, verkisto, pedagogo Vasil Eroŝenko en la lvova strato, portanta lian nomon, kaj kun okazigo enkadre de la kongreso de AMO-seminario, gvidata de la vicprezidanto de UEA Stefan MaccGill;

SUBSTREKAS la gravecon de la atingoj de ukrainaj esperantistoj en popularigo de la ukraina kulturo en la mondo pere de Esperanto kaj konigon de la esperanta kulturo al la ukraina socio kaj konsideras nepre necesa daŭrigi ĉi agadon, aktivigi publikan ĉeeston de Esperanto, ĝian instruadon en lernejoj kaj diversnivelaj kursoj;

PLEDAS por prezento de la aperigitaj enlande libroj kaj periodaĵoj en Esperanto al ĉiuj E-kluboj de Ukrainio, bibliotekoj, al la institucioj, kun kiuj kunlabaros esperantistaro;

ATENTIGAS, ke por intensivigo de la dialogo inter la ukraina kaj E-kulturo necesas firma enlanda E-movado, ĉiama aligo al ĝi de junularo, konstanta kunlaboro kun la gazeto "Ukraina Stelo";

ALVOKAS ĉiujn E-klubojn de la lando priparoli la materialojn de la kongreso, konkretan faritan kaj planatan laboron ĉi direkte, subteni la iniciaton okazigi la UkrEA-kongresojn en diversaj urboj de la lando, pli funde prepari ilin, partoprenigi pli da enlandaj kaj alilandaj esperantistoj.